



TEA-BULTENO

12^A JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 2011

NUMEROJ 11-12

Ĝis kiam la haŭta koloro pli gravos ol tiu okula, ĉiam estos milito.
Robert Nesta Marley, regeisto el Jamajko, 1945-1981

At la legantaro

En viaj manoj la lasta bulteno de jaro 2011^a. Jes, jam proksimiĝas nova jaro, la 2012^a, dum kiu TEA estos engaĝita en tre grava evento. Jam oni preparolis pri iu ebla aranĝo en nia urbo, sed ĉio ankoraŭ ne havis tre difinitajn konturojn, por povi plene informi pri la okazaĵo. Nun *jam temp' està* kaj jen klarigo pri estonta aktivado, duone de venonta jaro.

Projekto: Eŭropo por civitanaro

Eŭropa Esperanto-Unio prezentis ĉi-projekton al Eŭropa Komisiono-Ekzekutivagentejo por kulturo, edukado kaj aŭdvideblaĵoj, kiu ricevis aprobon kaj financadon por organizado de Konferenco pri la temo: 'Kiel aspektus Eŭropo komence de la 21^a jarcento, se ne ekzistus Eŭrop-Unio?'. La evento okazos de la 9^a ĝis la 11^a de majo 2012 en Triesto, kun partopreno de slovenaj, kroataj kaj slovakiaj partneroj kaj kunlaborado de Triesta Esperanto-Asocio, kiel oficiala partnero okupiĝonta pri la tuta surloka organizado. Celo de la Konferenco estas substreki iujn gravajn aspektojn pri ekzisto de Eŭropa Unio, tiajn por montri al ties civitanaro, ke hodiaŭ en Eŭropo la situacio estas multe pli malbona sen EU, kaj eble eĉ la tuta kontinento povus iĝi scenejo de novaj militkatastrofoj.

La celpubliko estas ĵurnalistoj kaj studentoj pri ĵurnalismo el diversaj Eŭropaj landoj. La Konferenco disvolviĝos laŭ kvar diversaj branĉoj: politika, ekonomika, historia kaj defendo de homaj rajtoj. Konferenca debatestro estos prof-ro Paolo Alessi, prezidanto de triesta Unesko-Centro.

Estas antaŭviditaj partopreno de politike engaĝitaj personoj, kiuj aktive laboris por kunkreado de Eŭropa Unio: inter tiuj menciindas la eksaj prezidentoj de Slovenio, Milan Kučan, kaj de Kroatio, Stjepan Mesić, kiuj jam konfirmis sian ĉeeston. Jam aliĝis ankaŭ kelkaj eŭropaj parlamentanoj kaj diplomatoj, kiaj d-ro Sean O'Riain, Irlando, kaj d-ro Giorgio Novello, Italio.

Por la ekonomika sekcio, verŝajne partoprenos la Nobel-premiito pri ekonomiko, prof-ro Reinhard Selten, Germanio, kaj prof-ro François Grin, Svislando.

Por historio, estas antaŭvidita ĉeesto de la slovena historiisto d-ro Božo Repe kaj de d-ro Thomas Jansen, Germanio/Italio.

En Triesto oni jam ekaktiviĝis kontaktante lokajn instancojn, serĉante ejojn por akcepti la konferencanojn, kiuj supozeble konsistos el ĉ. 130 personoj, k.a. Sed tia projekto ne facile realigeblos sen helpo de ĉiu el vi: temas pri vere tre grava aranĝo dum kiu Esperanto aktivan rolon ludos, en sia plej taŭga vesto de interkultura perilo.

Por pliaj detaloj, por klarigoj, por kompreni pli bone, ĝuste kiun rolon ankaŭ vi povas ludi en tiu ĉi grandioza okazaĵo, ni estas je dispono ĉe TEA-sidejo marde kaj vendrede, aŭ telefone aŭ hejme. Ni atendas vin!

Kaj laste "Bonan jarfinon (iom antaŭtempe, sed sinceraj!) kaj ĉiam antaŭen, kun, per kaj por Esperanto!"

Via flda

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Ĉu vere vi konas vian urbon? Ne hontu, se vi kuraĝe respondas ke ne, aŭ, pli bone, 'nu, ... jes, sed ege malmulte'. Ĉu vi ŝatus ricevi respondojn al demandoj kiujn - eble - neniam vi faris al vi mem? Se jes, hazarde vi povus malkovri ion vere ... tute neatenditan! Ĉiu urbo kaŝas ĵaluze siajn sekretojn, iaajn kuriozaĵojn, strangajn anekdotojn, historietojn, etajn misterojn ... sufiĉas tamen ke vi montru iom da intereso, tiam ĝi malfermos antaŭ vi siajn por-

dojn malantaŭ kiuj estas trezoroj, trezoroj de scioj, de ebloj kompreni pli bone vin mem kaj la urbon de vi amatan, de valoraj oĵoj iel forgesitaj.

Kaj, fine, kiel diris Albert Einstein: 'La plej grava afero estas neniam ĉesi demandi.' Tial, jen la unua demando:

1) La originoj de Triesto estas tre, tre antikvaj. Oni rakontas, ke la fondinto de la urbo estis iu *Tergeste* (elp. Terĝeste), amiko de Jazono kaj Argonaŭtoj, dezirintaj halti ĝuste ... tie ĉi! Al kiu, pli reale kaj probable, oni devus atri-

bui la originon de la urbo kaj kia estas la etimologio de la nomo 'Tergeste'?

2) Kian rilaton havas la fama franca verkisto Jules Verne kun Triesto?

3) En strato *Stadion* situis iam teatro, kiun detruis brulego en 1876. Samloke, post tri jaroj, oni konstruis teatron *Fenice* (elp. Feniĉe). Kiu estis la nomo de tiu teatro forvorita de la flamoj?

Ĉu malfacilaj demandoj? Ĉu vi kapablis respondi? Do, iru al la 6^a paĝo kaj kontrolu ĉu via respondo korektas aŭ ne!

Laste trovitaj!

Ĉi-foje mi prezentas al vi bildkarton aparte interesan por italaj esperantistoj: temas pri karto, sendita de Romo je la 18^a de aprilo 1904 kaj atinginta Budapeŝton, Hungario, la 30^{an} sammonate. Gi estis adresita al s-ro Endre Varju de la elstara esperantista pioniro el Romo, pastro Luigi Giambene.



Jen la teksto:

Tre kara Amiko mia - mi ricevis vian karan poŝtan karton, kaj mi volis tuj respondi, sed mi estis tre okupata: pardonu do min. Tiun ĉi karton desegnis Roma esperantisto⁽¹⁾ kaj mi ĝin miaelspeze presigis. Ĝi ne estas belega, sed bona por propagando. Mi skribis al la Direktoro de l' budapeŝta gazeto ke li sendu al mi provnumeron. La hungarajn vortojn mi ne komprenis sed mi trovos personon kiu ilin klarigos al mi. Kun tre koraj salutoj al ĉiu via familio tutkore via DL Giambene



Sur la karto, supraparte, belkarakteraj kaj elegantaj, 'novstila' skribo: 'Lingvo Internacia Esperanto' kaj maldekstrflanke, 'Roma Grupo Esperantista'. En 1904 tamen ankoraŭ ne estis oficialigita la loka E-grupo (tio fakte okazos en 1905), do li iom antaŭe anoncas pri ties ekzisto.

Nun kelkaj informoj pri tiu ĉi tre grava kaj eminenta esperantisto, kiu senlace kaj tre energie laboris kaj por disvastigo de la lingvo kaj ankaŭ, eble ĉefe, por rekono de ĝia valoro en la katolika medio. Luigi Giambene naskiĝis la 26^{an} de novembro 1866 en Romo, kie li mortis en 1944. Li estis konsekrita pastro en 1899, nur 23-jaraĝa. Tre bona konanto de lingvoj, li estis profesoro pri hebrea kaj greka lingvoj en roma Universitato *Propaganda Fides* (ekde 1905). Plej verŝajne li renkontis sur sia vojo Esperanton jam en 1902, kaj ekde tiam komencis instrui ĝin. En 1905 Giambene iĝis 'monsinjoro', nome 'sekreta servisto' de Papo Pio la 10-a, kio donis al li la eblon plurajn fojojn lin viziti, kaj dum tiuj okazoj ofte ili interparolis pri la Internacia Lingvo. Januare 1908 aperas la unua numero de 'Roma Esperantisto', kies direktoro kaj administranto li fariĝas. Unupaĝe legeblas tre emfaza saluto: "Enirante la batalan kampon ROMA ESPERANTISTO sendas al **Dro L. L. Zamenhof** plej respektplenan, dankeman saluton!" En la sekva numero, sub KRONIKO, la respondo de d-ro Zamenhof: 'Kara sinjoro. La ekz. de 'Roma Esperantisto' mi ricevis kun plezuro kaj danko. Mi deziras al via revuo la plej bo-

nan sukceson. Kun kora saluto, Via Dro L. Zamenhof.'

Krom esti tre lerta instruisto kaj gvidanto de pluraj kursoj, li ankaŭ verkis manlibron pri Esperanto, tre ampleksan itala-esperantan vortaron (ĉirkaŭ 4.500 kapvortoj) kaj antologion 'Tra la esperanta literaturo', konsistantan el kvindek da elĉerpaĵoj, literaturaj, sciencaj kaj eseaj. Tre skize pri tiu ĉi grava personeco: al tiuj kiuj ŝatus scii iom pli, konsilindas la legado de 'L'esperanto in Italia' - Carlo Minnaja, 2007; aŭ 'Origini del movimento esperantista a Roma' - Carlo Sarandrea, 2005, ambaŭ itallingvaj.

Nun, el la serio de esperantistaj karikaturaj desegnitaj de grafikisto Jean Robert, la franco Ernest ARCHDEACON, naskiĝinta je la 28^a de marto 1863 en Parizo kaj mortinta en 1950 en Versajlo. Li estis advokato kaj interesiĝis pri ĉiuj specoj sciencaj problemoj, kiaj fotografado, kartografio k.a. Li okupiĝis pri diversaj sportoj: sfera balono (1885), aŭtomobila veturado kaj aviado. En 1896 Archdeacon kunfondis la 'Automobile Club', kiu energie antaŭenpuŝis la uzadon de aŭtomobilo. Post tio li konstruis ankaŭ diversajn aparatojn por flug-veturado.



La aviadilo Archdeacon, konstruita en Chalais-Meudon (1904)

Li esperantistiĝis en 1908 kaj komencis verki artikolojn, kiuj estis publikigitaj en multaj Esperantaj kaj francaj revuoj. Li iĝis prezidanto de la Pariza grupo kaj poste (1926) de la Societo por Propagando de Esperanto. Energie li klopodis, recipe per malvaraj monferoj, por kuraĝigi lernantojn, unuigi la aktivajn esperantistojn kaj altiri valorajn personojn el la altaj medioj. Archdeacon estis ankaŭ lingva komitatano (1932) kaj verkis propagandan libron.

⁽¹⁾ dekstrflanke, legeblas 'Trinchieri' (Fontoj: Enciklopedio de Esperanto; Vikipedio; 'Roma Esperantisto'; 'L'Esperanto in Italia', C. Minnaja; 'Origini del movimento esperantista a Roma', C. Sarandrea).

Eblas aĉeti jam nun, ĉe libro-servo de UEA, la glumarkojn reklamantajn la 97^{an} UK-on, en Vjenamio (28 julio-4 aŭgusto 2012). Pliibeligu la kovertojn de viaj korespond-aĵoj per tiu ĉi kolora emblemo!



PLIOFTAJ PARONIMOJ

Jen tria listo de paronimoj, kiun pretigis VIGLO, fidante vian bonvolan konsideron.

Ĉampano	blanka ŝaŭmvino	Ekranio	fendro; ŝirmilo; blanka kinematografa tuko; antaŭa plato de televidilo, monitoro
Ŝampano	orientlanda boato	Krano	aparato por elfluaĵo de likvaĵo aŭ gaso
Ĉampinjono	manĝebla fungo	Ekskrecio	nebezona subprodukto de iu glando
Ĉampiono	porbatalanto; venkinto en sportkonkuro	Ekskremento	fekaĵo, malpuraĵo
Ĉizi	kavigi malmolan surfacon	Rekremento	restaĵo el fruktoj post ekstrakto de suko
Incidi	trafi surfacon, ne penetrante en ĝin (lumradio ks)	Ekzekucio	konfisko
Inciti	eksciti ies koleron	Ekzekuto	leĝa mortigo
Instigi	puŝi iun al ago	Empireo	plej alta ĉielparto ĉe Helenoj
Damaĝo	difekto	Empireŭmo	odoro de distilado de bestaj aŭ plantaj substancoj
Domaĝo	bedaŭrindaĵo	Empirio	nescienca metodo bazita sur nura praktika sperto
Debato	diskutado ekz. en parlamento	Empiro	stilo de meblaro
Debeto	ŝuldo aŭ la sumo de la ŝuldo	Emporio	granda komercurbo
Debito	facila vendado de varo	Enflui	flui en ion
Debuto	unuafoja apero antaŭ la publiko	Influi	havi efikon sur alia persono
Delfeno	mara mambesto	Enporti	internen porti
Delfinio	(bot.) genro de ranunkolacoj	Importi	enporti en landon
Demeti	flankenmeti	Entomologio	scienco pri insektoj
Dementi	malkonfirmi	Etimologio	scienco pri la origino de vortoj
Deserto	lasta manĝaĵo en la menuo	Etiologio	studo pri la kaŭzoj de malsanoj
Dezerto	senviva regiono, sablomaro	Etnologio	scienco esploranta originon de popoloj
Deveni	origini	Etologio	scienco pri deveno de moroj; scienco pri la karakteroj
Diveni	malkovri per intuicio aŭ rezonado ion, kion oni ne scias	Erao	epoko
Digesto	asimilpretigo de nutraĵo	Ero	konsistiga elemento de tutaĵo
Digesto	resuma mallongigo de libro	Etaĝo	de domo; geologia tavolo
Diluvio	geologia epoko; plejstoceno	Etaĝero	mebleto konsistanta el kelkaj bretoj
Diluvo	inundego	Fabo	speco de vicio
Dino	(fiz.) unuo de forto	Fago	speco de arboj
Duno	sabla montetforma akumulaĵo	Favo	kontaĝa haŭtmalsano
Diserti	prezenti en universitato studaĵon	Fabelo	nekredebla rakonto
Dizerti	fuĝi el militista servo	Fablo	rakonto en kiu agas k parolas bestoj
Diskuti	interparoli prezentante sian opinion	Faceto	malgranda faco
Disputi	akre diskuti	Facio	antaŭa kapoparto
Dormo	stato de dormanto	Faco	antaŭa parto de surfaco de objekto
Dorno	planta pikilo aŭ io simila	Fajfi	produkti akutajn sonojn
Drinki	malmodere trinki ebriigaĵon	Fajli	ebenigi aŭ glatigi metalon, lignon k.a. skrapante per aparta ilo
Trinki	gluti likvaĵon	Faldo	spaco inter du elstaraj partoj de io faldita
Duŝi	submeti iun al duŝo	Falto	haŭtsulketo ĉe frunto, vizaĝo aŭ interno de manoj
Tuĉi	desegni literojn per tuĉo		
Tuŝi	palpi; (fs) pritrakti temon		
Efluvo	elektra malŝargo		
Elfluo	tio kio moviĝas de unu loko al alia		
Eklipso	nedaŭra ŝajna malapero de astro		
Ekliso	(ne PIV-a) ŝtala tabuleto kunliganta la fervojrelojn		

Tre interese rimarki la tute kontraŭajn signifojn en esperanto de la vortoj **Inciti** kaj **Instigi**, rilate al itala lingvo.

Fakte en la itala **Incitare** signifas: "*esplicitamente aŭ rekte plivigli pro difinita konduto*" [Devoto-Oli, 1997, p.1469] kaj tio respondas al la esperanta verbo **Instigi**. La sama vortaro, pĝ 1585, pri la itala **Istigare** donas jenan difinon: "*puŝi iun, per sugestoj ... ofte nesinceraj, al malaprobindaj agadoj kaj plejparte laŭleĝe kondamnataj*", do, tute simila al la negativa signifo de la esperanta **Inciti**.

Tia la beleco de tio, kion mi nomas lingvo-malsamecon, tute simila al bio-malsameco de la vivantaj estaĵoj.

Tra nia mondo...

★Venu kune festi★ dum la jarfina semajnfino aŭ amuziĝi eĉ dum tuta semajno: ekde la 26^a de decembro ĝis la 2^a de januaro 2012. Venu kun via tuta familio aŭ viaj plej bonaj geamikoj, ili bezonas koni nur UNU Esperanto-vorton: "fantomo". Por povi serene dancadi kun iu el la kastelaj fantomoj, masko-vestu vin kiel ili, diamant-brile aŭ dent-timige. Prelegu pri sorĉitaj anglaj kasteloj aŭ alia temo.

★Loko: Esperanto-kastelo Greziljono en urbo Baugé, 275 km sudokcidente de Parizo. Ni peras kunveturadon.

★Informoj: <http://gresillon.org/jarfino>

★Aliĝilo: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique27>

NB: Redukto de 10% se antaŭpago ĝis la 26^a de oktobro por 5-6-taga restado.

★Adreso: Esperanto-KulturDomo - Château de Grésillon - FR 49150 SAINT MARTIN D'ARCE

★Telefono-respondilo: +33-2.41.89.10.34

★Ret-poŝto: kastelo@gresillon.org

8^a Internacia Konkurso pri Poezio KASTELO DE DUINO 2012

Estas publikigitaj la partopren-kondiĉoj de la 8^a Internacia Konkurso pri Poezio, en Triesto, Italio. La konkurso estas dediĉita al junularo (ĝis 30 jaroj) kaj lernejoj. Eblas partopreni per poeziaĵoj kaj/aŭ teatraĵoj. La temo estas: **SPEGULOJ/ MASKOJ**. Limdato: la 7^a de januaro 2012.

La tutan regularon kaj aliĝilon eblas trovi ĉe <http://www.castellodiduinoepoesia.it/bandi/bandi-stranieri/bando-esperanto>

Pri Tibor Sekelj kaj Vikipedio en Malferma Tago

La 35^a Malferma Tago de la centra Oficejo de UEA, la 26^{an} de novembro, atentos la 100-an datrevenon de Tibor Sekelj (1912-1988), pri kies multfaceta vivo prelegos la Esperanto-verkistino Spomenka Štimec. La datreveno de Sekelj fakte estos en februaro, tiel ke la novembra Malferma Tago fariĝos enkonduko al la jaro, dum kiu okazos ankoraŭ multaj aliaj aranĝoj omaĝe al tiu fama mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto.

Alia temo de la Malferma Tago estos **Vikipedio**, pri kies evoluigo kaj utiligeblo parolos d-ro Ziko van Dijk. Ekde majo ĉi-jare li estas prezidanto de Wikimedia Nederland, la nederlanda filio de Fondaĵo Vikimedio kiu estras tiun ĉi liberan retan enciklopedion. En la posta tago en la CO okazos ankaŭ seminario por esperantistoj-vikipediistoj.

En la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

Semajna interreta televida programo el Meksiko

La Esperanto-movado de Meksiko estigis televidan programon parolatan en Esperanto. Ties nomo estas Me-Info, mallongigo de Meksika Esperanto-Info. La elsendoj okazas per interreto, ĉiuvendre je la 2:00 UTC, ĉe la adreso:

<http://www.telecentral.com.mx/casts/meinformo/programas.html>

Redaktas kaj prezentas la programon lernantoj de Esperanto-kursoj de la urbo *Agua Calientes*.

La televidprogramo estas elsendata realtempe ĉiuvendre ekde la 21^a ĝis la 22^a horoj laŭ la meksikurba horaro kaj celas informi pri diversaj naciaj kaj internaciaj aktualaĵoj.

Temas pri la unua meksika Esperanto-programo, en kiu partoprenas junuloj el diversaj Esperanto-kursoj kaj fakuloj de la urbo *Agua Calientes* kaj kondukas la programon *Cente kaj Leo*. En la retejo de "Me-Info" estas je dispono ankaŭ registraĵoj de du antaŭaj elsendoj, libere spekt-eblaj. "Me-Info" estas grandparte nacilingva, sed kun iom da klarigoj ankaŭ en Esperanto.

Esperanto-kafejo kaj -hoteloj en Herzberg

1. En la ĉefstrato de urbo Herzberg estas malfermita **Esperanto-kafejo** (kun oferto de ĝin-senga kaj aligustaj teoj kaj kelkaj kukospecoj) en la korto de la domo de lokaj entreprenistoj ĝesinjoj Schicke. Ili uzas menukarton kaj varb-ŝildon sur la dommuro en Esperanto.

2. Esperantisto el Vieno, Amir Javadi, iama posedanto de Esperanto-Paradizo, aĉetis la malnovan Hotelon *Goldener Hirsch* kaj translokiĝis al Herzberg. Li komencis renovigadi la konstruaĵon.

3. Esperantista familio el Pollando aĉetis 3-stelan hotelon *Zum Pass* en Sieber. Teresa Liberska jam de kelkaj monatoj loĝas en Herzberg kaj helpas la lernejan instruadon kaj agadas kiel administranto por ILEI. Pliaj aktualaĵoj pri Herzberg: <http://esperanto-urbo.de/blog.php>

Anstataŭ vortaro - havi frazaron por kompreni la vorton en natura ĉirkaŭaĵo

Nunateme la frazokolekto TATOEBEA atingis pli ol 1.128.229 frazojn, el kiuj 105.054 estas en Esperanto, kiu plu tenas la trian lokon rilate al la nombro de frazoj, post la angla kaj japana, respektive kun 207.454 kaj 160.457 frazoj.

La frazoj en TATOEBEA, <http://tatoeba.org>, estas iom post iom tradukataj al intertempe 93 lingvoj, el kiuj unu estas Esperanto. La ideo estas havi ne nur vortaron, kiu donas la tradukon por unuopaj vortoj, sed havi la tradukon de kompletaj frazoj por kompreni la vorton en natura ĉirkaŭaĵo. Oni povas serĉi frazojn kun difinita vorto en unu lingvo, kiu havas tradukon en iu alia.

La frazaro TATOEBEA daŭre kreskas: ja post aliĝo oni povas aldoni proprajn frazojn, kutime tradukojn de tiuj, kiuj estas jam en la kolekto. Ne ĉiam estas facile trovi taŭgajn tradukojn kaj kelkfoje oni iom diskutas pri unuopaj versioj. TATOEBEA estas nur unu el multaj lokoj, kie Esperanto-parolantoj povas ekzerci siajn tradukajn kapablojn kun iom da utilo.

Informis Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

Amuziĝu, kreante proprajn krucenigmojn!

Per la Esperanta versio de la programo *Javascript Crossword*, adaptita de "Klivo", oni povas krei proprajn krucenigmojn. En ĝia retejo estas trov-eblaj ŝablono, konstruilo, kaj oni povas senpage elŭti ankaŭ la tutan programon. Adreso de la retejo: <http://krucenigmoj.tripod.com/>

Fontoj: Gazetaraj komunikoj de UEA; Ret-info - L. Szilvási



Fazeoloj en forno

De Fani Riznar, el Izola, tre ĉarma apudmara urbeto en Slovenio, mi ricevis ĉi recepton, tre taŭgan por surtabligi ĝuste nun, en ĉi malvarmiĝanta aŭtuno: ĝi aparte donas la bezonatajn kaloriojn, proteinojn kaj vitaminojn, kiuj pleje estas necesaj en ĉi sezono. La recepto estas facile realigebla, tre simpla kaj ege bongusta, kiu certe tiklos la apetiton de viaj familianoj kaj gastoj. La uzendaj fazeoloj estas tiuj grandaj, nomataj "Blankaj el Hispanujo".



Ingredienoj (por 4-6 personoj):

- 1 kg da sekigitaj blankaj fazeoloj
- 1/2 kg da cepoj
- du kuleroj da faruno
- 100/200 g da duongrasa lardo
- du-tri laŭro-folioj
- ruĝa pulvorigita papriko (kvanto laŭplaĉe)
- oliv-oleo k.b.
- salo k.b.

Preparado

Tutan nokton trempu la fazeolojn en malvarma akvo. Je mateno, elprenu la moligitajn fazeolojn kaj enmetu ilin en kuirpoton plenan je nesalita, malvarma akvo. Aldonu 2-3 laŭrofoliojn kaj duongrasan lardon. La tuton boletu ĝis moliĝo de la fazeoloj (pli-malpli tio daŭras ĉirkaŭ unu horo ĝis maksimume 2, tion oni kalkulas ekde ekbolo). Fine forprenu kaj la laŭrofoliojn kaj la lardon. Prefere en terakota poto, varmetigu la oliv-oleon kaj en ĝi fritetu la haketitajn cepojn, zorge ilin miksante ĝis ekblondiĝo. Tiam aldonu la farunon, ĝin milde brunetigu kaj fine enmetu la fazeolojn kun parto de la likvaĵo, en kiu tiuj kuirigis, poste la pulvorigitan paprikon, salu kaj enverŝu la tuton en diversajn malgrandajn terakotajn potetojn, tiomajn kiom da gastoj vi invitis viahejme. Ilin enfornu, je mezalta temperaturo, ĝis kiam apetitveka krusteto formiĝas supraĵe. Surtabligu la potetojn kaj... bonan apetiton!

Tiu ĉi plado estas ne nur nedubinde frandenda, sed ankaŭ tre saniga: jen ĉi-sekve eta prezento de la ĉefrolantoj de tiu ĉi recepto!

Malgranda historio pri fazeoloj.

Fazeolojn tre bone konis la antikvaj grekoj kaj romianoj, kaj tiuj, kiujn ili manĝis tiam, devenis el Azio kaj Afriko. La fazeoloj, kiujn ni nun konsumas, originas el Centra kaj Suda Ameriko kaj estis portitaj al Eŭropo de hispanoj kaj portugaloj ĉirkaŭ komence de la 16^a jarcento, post kiam ilin malkovris la fama esploristo kaj naviganto Kristoforo Kolumbo dum sia dua vojaĝo en Kubo. En Meksiko la fazeoloj estis kultivitaj jam ekde antaŭ 7 mil jaroj. Do, en Eŭropo kaj sekve precipe en norda Italio, ili disvastiĝis kaj aperis sur la tabloj, ne de malriĉuloj, sed de tiuj de la plej riĉaj kaj nobelaj klasoj. Fakte nur plej monhavaj personoj povis ilin gustumi kaj ofte ili estis uzataj kiel grava omaĝo okaze de specialaj aŭ gravaj eventoj.

En Mezepoko, kiam Eŭropo estis trafita de impojn malabundo kaj mizero, pligravigitaj de pestaj epidemioj, la homoj havis malfacilaĵojn akiri manĝaĵojn: ĝuste legomoj kaj precipe semlegomoj, kiaj la fazeoloj, povis alporti tiujn bezonatajn proteinojn per kiuj eblis restabiligi kaj plifortigi la popolon en tiu tre vivdanĝera, malfeliĉa periodo. Speciale helpis do, en tiu kazo la fazeoloj.

Sed kiaj estas la ecoj de fazeoloj? Ili havas tre gravajn specifaĵojn, ne nur nutrajn. Fakte kreskigi fazeolajn plantojn sur tereno signifas ĝin riĉigi per nitrogeno (azoto), kiu estas tre valora elemento kapabla plibonigi kaj la kondiĉojn kaj la karakterizaĵon de la grundo. Fazeoloj estas tre nutraj kaj riĉaj je A-, B-, C- kaj E-vitaminaj. Pri C-vitamina, oni devas atenti, ke tro longedaŭra kuirado de la fazeoloj konsiderinde perdigas ĝin. Krome, tiuj ĉi semlegomoj posedas mineralajn kaj oligomineralajn salojn kiel kalion, feron, kalcion, zinkon kaj fosforon, kaj, kiel ĉiuj aliaj semlegomoj, ili enhavas grandan kvanton da lecitino, tre grava por la emulsio de graso, ĉar ĝi malhelpas ties akumuliĝon en la sango kaj, sekve, malpliigas la kolesterolan nivelon. Fazeoloj riĉas je fibroj, kiuj favoras la digestadon. Cent gramoj da sekigitaj fazeoloj liveras 24 gramojn da proteinoj kaj 2,5 gramojn da graso, dum sama kvanto da viando donas 15 gramojn da proteinoj kaj 15 da graso. Samkvante, fazeolo havigas 23% da proteinoj kontraŭ 15-20% liverata de fiŝo kaj 10-20% de viando. Tamen la fazeolaj proteinoj, eĉ se kvante superaj, kvalite estas iom pli malsuperaj ol tiuj de fiŝoj aŭ viandoj, ĉar mankas kelkaj esencaj aminoacidoj, pro tio konsilindas kunmeti en la manĝojn cerealojn kun fazeoloj. Tiuj aminoacidoj estas nemalhaveblaj ĝuste por la "konstruado" de proteinoj, do en tiu proceso ludas tre gravan rolon tiuj krudmaterioj, kiaj estas la aminoacidoj. Fazeoloj konsistas el 60 procentaĵo da amidoj kaj sukeroj kaj tre utilas kaze de dieto por kontraŭstari obezecon, ĉar 100 gramoj da fazeoloj liveras samajn kaloriojn kiel 80 gramoj da pastaĵo kaj 120 gramoj da pano, sen konsideri ke ili pliriĉas je fibroj. Plue tiuj semlegomoj helpas reguligadon de rena funkciado danke al siaj oligomineraloj.

Ekzistas pli ol 14 mil fazeolaj varioj, el kiuj grandparto devenas de Suda Ameriko, kaj el tiuj nur 22 estas utiligataj en kuirado.

Ĉiuj fazeolaj plantoj, ĝenerale, estas karakterizataj de rondformaj folioj kaj infloreskoj, ĉu bluaj ĉu ruĝetaj, kiuj produktas la guŝojn (aŭ legumojn), nome la fruktojn, havantajn plilongigitan formon: en ties interno troviĝas la semoj. La pluk-periodo varias laŭ la specioj, ĝenerale inter junio kaj oktobro.

Pripensendo: Se la piediro estus sana, tiam la poŝtistoj vivus eterne. La baleno naĝas tuttage, manĝas nur fiŝojn, trinkas akvon, spite de tio estas dika. La leporeto kuras, saltas kaj estas vegetarana kaj vivas 5 jarojn. La testudo ne kuras, nek saltas, nenien rapidas kaj vivas 450 jarojn.

Teksto de Jozefo Gulyás, el urbo Ódz; esperantigis László Pásztor, redaktanto de la retgazeto "Nordhungaria Informo", informilo de "Király Lajos" Esperanto-Amika Rondo Miskolc – Jul. Aŭg. Sept. 2011.

Novembra Programo	
4 vendredo	20h00 - Ankoraŭ Ĉinio! <i>Tria parto</i>
7 lundo	19h30 - 1-grada kurso
8 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
11 vendredo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno 20h00 - Krozado sur Yangtze-rivero - filmo de Edvige
14 lundo	19h30 - 1-grada kurso
15 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
18 vendredo	20h00 - Prelego pri 'Italaj esperantistoj laŭ eksterlandanoj'
21 lundo	19h30 - 1-grada kurso
22 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
25 vendredo	20h00 - 'TEA-anoj surbilde', de Anita
28 lundo	19h30 - 1-grada kurso
29 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
Decembra Programo	
2 vendredo	20h00 - 'Triesta dialekto' - konversacio kun Ennio Gerolini
5 lundo	19h30 - 1-grada kurso
6 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
9 vendredo	20h00 - 'Etimologio: skizo pri la deveno de la vortoj en Esperanto' - el prelego de Floriano Pessoa
12 lundo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno 19h30 - 1-grada kurso
13 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
16 vendredo	20h00 - Zamenhofa Festo: rememoroj pri lia vivo
19 lundo	19h30 - 1-grada kurso
20 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
23 vendredo	20h00 - Kristnaska Festo!
27 mardo	17h00 - 1- kaj 2-gradaj kursoj
30 vendredo	20h00 - Adiaŭ, 2011^a jaro!

Atentigo!

★ Fine de novembro vizitos nin esperantistoj el Kubo. Venu nombraj al TEA-sidejo por bonvenigi ilin! Pri alvendato vi estos informitaj ĝustatempe!
★ Ekde la venonta bultena numero, aperos nova rubriko al kiu vi estas varme invitata kontribui: tuta paĝo pri versaĵoj, ĉu de viaj ŝatataj aŭtoroj ĉu de vi mem verkitaĵ. Mi atendas ilin! Dankon!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17.30-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Retoj: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

E	RTO.	STA	OVE
AV	SSP	PR	RBOE
ERT	AS	VE	RBO
O, PR	O	ST	E

REG-PAŜO 2

Kiel en la pasinta Bulteno, Viglo proponas alian Zamenhofan proverbon. Paŝo post paŝo, de unu ĉelo al alia, trovu ĝin. Memoru, ke nur unufoje vi rajtas surpaŝi ĉeleton! Starto de la flavigita ĉelo. Ricevos premieton ankaŭ ĉifoje tiu kiu sukcesos ĝin solvi. Bonan ŝancon al ĉiuj!

Solvo de kvizo de Viglo

Pli tiras virina haro, ol ĉevala paro

Jen al vi la solvo de la kvizo aperinta en TEA-Bulteno septembra-oktobra. Okazis lotumado inter bulgara, germana, kroata kaj italaj solvintoj, kaj la bonŝanculo, Federico Dal Col, ricevis du libretojn: "Kvar Kasteloj" kaj "La Kastelo de Miramar", eldonaĵoj de Triesta Esperanto-Asocio. Gratulojn al la gajninto!

Respondoj al demandoj pri Triesto:

- 1) Plej probable la urbo estis fondita de venetaj proto-triboj kaj pri tio ĉi atestas la ĉeesto de 'castellieri' (elp. kastelieri, pra-vilaĝoj konstruitaj sur montetoj kaj ĉirkaŭitaj per muroj el ortanguligitaj ŝtonoj. Ne certas la etimologio de *Tergeste*: aŭ temas pri *Teregestum*, nome konstruita trifoje, aŭ pri kunmetado de hindoeŭropa radiko: *Terg* - bazaro, kun veneta sufikso *Este* - urbo.
- 2) Jules Verne skribis aventuran romanon, kies titolo estis '*Mathias Sandorf*', aŭ '*La komploto de Triesto*', unufoje publikigita en 1885. La tuta intrigo disvolviĝas en Triesto, sed ankaŭ en *Pisino* kaj *Ragusa* (respektive *Pazin* kaj *Dubrovnik*, Kroatio). La historio komenciĝas en Triesto, kie du krimuletoj alproprigas al si iun ĉifritan mesaĝon, kiu malkaŝis informojn pri iu konspiro celanta la apartigon de Hungario de la Habsburga imperio...
- 3) Teatro *Mauroner* (elp. Maŭroner), kiu estis en 1827 inaŭgurita. Teatro *Fenice* estis transformita al kinejo en 1913. Post la mondmilito, tie sin prezentis, inter pluraj aliaj famuloj, Josephine Baker kaj Louis Armstrong.



Plej Serenan
 Kristnaskon
 kaj
 Pacan 2012^{an} Jaron
 al TEA-anoj
 kaj Legantaro
 deziras
 Triesta
 Esperanto-Asocio